

Jezyčne prava i minoritne slovjanske jezyky Lingvaj rajtoj kaj minorigitaj slavaj lingvoj

de Giorgio Silfer

PEN-Klubo, aŭ PEN Internacia, dum la lastaj dudek jaroj aldonis la temaron de la lingvaj rajtoj al sia engaĝo favore al la esprimlibero kaj persekutataj verkistoj. El tiu interesiĝo fontis kvar dokumentoj, ĉiuj el la iberia duoninsulo.

La unua estas la Deklaro de Santiago (de Compostela), aprobita de la sama PEN-mondkongreso kiu agnoskis esperanton literatura lingvo, la 10an de septembro 1993. La dua estas la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, proklamita en Barcelono la 6an de junio 1996. La tria estas la Manifesto de Girona (Katalunio), aprobita en 2010 kadre de la PEN-Komitato pri lingvaj rajtoj kaj tradukarto. La kvara estas la Protokolo de Donostia/San-Sebastiano, oficialigita la 16an de decembro 2016.

En ĉiuj kvar dokumentoj PEN-Klubo ludas la rolon de ĉefa subtenanto, specife tra sia kataluna centro, ĉar katalunoj plej longe zorgis pri la menciita Komitato. La rolo de la aliaj minoritatoj, galega kaj eŭska, estis duaranga, kvankam ili partoprenis per propraj PEN-centroj la tutan procezon.

Konciza trarigardo pri la kvar dokumentoj. La Deklaro de Santiago preparis la terenon por la Deklaracio de Barcelono, kies rememorigo en kondensigita formo estis la Manifesto de Girona. La Protokolo de Donostia relanĉas la Deklaracion sur alia bazo. La grava teksto estas la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj. Kio karakterizas ĝin, tio karakterizas la ceterajn.

Kaj kio estas la ĉefa karakterizilo de la Deklaracio de Barcelono? La distingo inter lingva komunumo kaj lingva gupo, jam en la artikolo 1. Efektive la Deklaracio okupiĝas preskaŭ nur pri la rajtoj de la lingvaj komunumoj.

La distinga elemento estas la teritorieco, laŭ la koncepto de lingvo teritorie propra, kiu historie posedas propran teritorion. Tiu ĉi koncepto ne plene kongruas, tamen kunvivas, kun la slogano de la Deklaro de Santiago: “Ne mia nacio estas mia lingvo, sed mia lingvo estas mia nacio”. Esence, Santiago proponas ĝermon de *ius sermonis*, dum por la Universala Deklaracio gravas la implikoj de *ius soli*. En ĉi-lasta, kaj des pli en la Protokolo de Donostia, estas evidenta la aspiro al la disvolvo de politika aŭtonomio en la kuntekstoj karakterizataj de lingvo teritorie propra.

La temo estas klare difinita laŭ la supraj linioj se temas pri Okcidenta Eŭropo, kaj specife pri Hispanio, regno kies konstitucio, en la artikolo 3, fiksas la kompromison pri la lingva juro: En Hispanio oni parolas diversajn hispanajn lingvojn, la kastilia estas unu el ili; “ĉiu hispano havas la rajton paroli ĝin, kaj ĉiu hispano havas la devon kompreni ĝin”. Nome, ekzistas en Hispanio la devo de pasiva uzo, sed nur la rajto, ne la devo de aktiva uzo.

Ni rimarku pretere, ke la koncepto pri lingvo teritorie propra koincidas nur parte kun la *territorialprinzip*, aplikita en Svislando.

La granda, sed ne la sola, novaĵo de la Protokolo de Donostia estas ĝia transiro de la zorgo fare de PEN al subteno fare de pluraj subjektoj kiuj interesiĝas pri lingvaj rajtoj. Tamen ni rimarkas ke, escepte de du, tiuj subjektoj aŭ havas oficialan sidejon en Katalunio, aŭ havas katalunan prezidanton respektive manaĝeron. La katalunisma komponanto restas la ĉefa, kaj tio, ankaŭ lige kun la politika konjunkturo en Katalunio (en Hispanio ĝenerale), kondiĉas ankoraŭ la tutan procezon.

Pli komplika fariĝas la kompreno pri la principoj de Barcelono kaj Donostia, se temas pri aliaj mondopartoj. Ni ekzamenos ĉi tie la situacion de la slavaj lingvoj.

Se ni rigardas la lingvan mapon de Eŭropo, ni tuj vidas ke, inter la grandaj koloraj blokoj en okcidento (kastilia, franca, angla, germana, itala) kaj la vasta areo de la rusa, situas kolora mozaiko.

En okcidenta Eŭropo la lingvaj minoritatoj okupas plejparte periferiajn areojn kaj vivas margene de la lingvaj majoritatoj: tiel la kimra kaj la

gaela en Britio, la bretona kaj la korsika en Francio, la albana kaj la kataluna en Italio, la eŭska kaj la galega en Hispanio.

En mezorienta Eŭropo, inter la germana kaj la rusa blokoj, situas multaj etaj Ŝtatoj, kun relative malgrandaj populacioj, parolantaj lingvojn teritorie proprajn. La etnoj, kaj la respektivaj lingvoj, intermiksiĝas pli ol en okcidento sur relative malvasta areo: fenomeno renkontebla en okcidento praktike nur laŭ la linio de la Rejno, kie najbaras tri ĉefaj idiomoj (germana, franca, nederlanda) kaj la respektivaj dialektoj.

Alia grava diferenco inter la du partoj de Eŭropo estas la nuna kreskanta ĉeesto de enmigrintoj, ofte el ekstereŭropa deveno, en okcidento. Siavice oriento konis kaj konas pli multe la fenomenon de diasporoj, kiaj estas la roŭma, la juda, eĉ la esperanta – historie situas multe pli da esperantistoj ĉi tie, ol en okcidento.

Sed ankaŭ gravas la komuna slava bazo, pli forta ol estas ĉe latinidaj kaj ĝermanaj popoloj. La praĝermana apenaŭ estas rekonebla inter la angla kaj la germana, kaj amaso da falsaj amikoj minas la latinan komunecon de la franca, hispana kaj itala. Des pli grave: la plej parolataj lingvoj latinidaj kaj ĝermanaj fariĝis koloniaj lingvoj, tiel ke ilia ekspansio kaj evoluo ne restis limigita al Eŭropo, dum la slavaj (kun la siberia kaj kaŭkaza esceptoj de la rusa) restis nur eŭropa fenomeno, teritorie tre ĉirkaŭita en specifa mondoparto.

Unu el la konsekvencoj de tiu diferenco inter okcidento kaj oriento estas la fakto, ke dum la lingva unueco ne havus sencon inter la ĝermanaj, aŭ inter la latinidaj, ĝi estas teorie hipotezebla inter la slavaj, kaj estus preskaŭ probabla, se ne ekzistus unuavice la alfabeto diverĝo, spegulanta religian (kaj kulturan) skismon.

Kaj ĉar ni mencias religion: sen la protestantismo, kiu kondukis al la tradukoj de la Biblio, multaj ĝermanaj minoraj lingvoj ne plu ekzistus. Ne hazarde en la svisa kantono Grizono la romanĉa rezistis inter la protestantoj, dum la katolikoj, fidelaj al la habsburga imperiestro, lingve germaniĝis.

Kompreneble ne mankas minorigitaj lingvoj ankaŭ en la vasta slava areo. Ĉar ni estas en Moravio, sufiĉas memori pri la versoj de Petr Bezruč dediĉitaj al la silezia minoritato. Sed ni rajtas aserti ke la perspektivo en slavaj landoj estas profunde malsama de tiu en Iberio.

Tio kondukas al dubo pri la aplikeblo de la Protokolo de Donostia en la slava parto de Eŭropo, krom se temus pri la defendo de neslavaj minoritatoj inter slavaj majoritatoj, kiel en Slovakio.

Kaj la sama dubo koncernas aliajn mondopartojn, ekzemple Hindion, kie la koncepto de lingvo teritorie propra kolizias kun la socia realo, pli simila al bunta kunmiksaĵo ol al mozaiko. Samtempe, ĝuste Azio donas al ni alian dubon, pri solvo analoga al tiu aŭgurebla tra slava unuiĝo: la ekzemplo de la indonezia. Sed tio estus temo jam por alia prelego.